

# NEDERLANDA KATOLIKO

OFFICIEEL ORGAAN VAN DEN NEDERL. R.K.  
ESPERANTISTENBOND „NEDERLANDA KATOLIKO”

MAART 1930

No. 11



---

---

# BEHALVE DE LECTUUR

in ons vorig nummer geannonceerd

OP DEZE PLAATS,

is thans ook verkrijgbaar.

## HIMNO

DE LA

## KATOLIKAJ ESPERANTISTOJ

Poezio de F Pizzi.

Muziko de Sante Zanon.

PRIJS (met piano-begeleiding): f 0.50.

TE BESTELLEN BIJ:

P. A. SCHENDELER, EINDHOVEN

Prins Hendrikstr. 30e

---

---

# Nederlanda Katoliko

Maandblad, Officieel Orgaan van den Nederlandschen R.K. Esperantistenbond „Nederlanda Katoliko”, gevestigd te 's Hertogenbosch.

Opgericht 29 Augustus 1909. Bisschoppelijk en Koninklijk goedgekeurd

Ĉio per amo, nenio per forto. (*S. Franc. de Sales*)

Geestelijk Adviseur LAMB. J. J. M. POELL

Vaste Medewerkers: Br. Augustinus, H. Damen, Br. Eulogius,  
Pater Call. Preller O P., H. A. Roelofs, P. A. Schendeler,  
H. B. van Zwet.

Abonnementsprijs  
f. 1.50 per jaar  
Eksterlanda Jarabono f. 2.—

HOOFDREDACTIE  
P. A. SCHENDELER  
EINDHOVEN

Afzonderlijke nummers  
20 cent.  
Advertentiën  
30 cent per regel.

Administratie J. A. LEIBBRAND, Tilburg.

## SALUTON

al „La Matenstelo”, Roosendaal  
amike sendas V.E.R.O.

1.

Kiam sin montras la Stelo Matena,  
Estas pasintaj ripoz' kaj dormad';  
Kaj la batalo de l'vivo denove  
Nin ekokupas per vigla farad'.  
(Rekantajo:)  
Ni, kunigante laboron kun preĝo,  
Ĝoje nin donu por Kristo la Reĝo!

2.

Stelo Matena, ŝlosilo-trueto,  
De l'laborejo de nova la tag',  
Kie de ni atendiĝas laboro,  
Kie de Di' atendiĝas la pag'.

3.

Stelo Matena, nur tiu sukcesos  
En sia tasko de taglaborist',  
Kiu eniras la taglaborejon  
Per la ŝlosilo: la Kruc' de la Krist'.

Stelo Matena, ni certe sukcesos,  
 Ĉar, enirante kun bona intenc',  
 Ĉiam ni uzas la Kruco-ŝlosilon:  
 Fino bonega post bona komenc'.

---

## Laat ze maar Nederlandsch leeren.

Wat wordt er toch soms vreemd onder de menschen geredeneerd! Men meent alles zoo duidelijk mogelijk te hebben voorgesteld, zoodat alles zoo klaar is als 'n klontje, zoo helder als kristal, zoo duidelijk als tweemaal twee is vier,..... en daar opeens trekken ze 'n conclusie, waarvan je eenvoudig paf staat.

Ziehier het geval.

In zekere plaats in ons lieve landje, waar op 't oogenblik zoovele edelachtbare hoofden zich rimpelen om het gewichtige vraagstuk van facultatief (ja, **facultatief**) onderwijs van gemeentewege aan de jeugd buiten de schooluren (ja, **buiten de schooluren**), had deze kwestie ook de gemoederen in beweging gebracht. B. en W. adviseerden afwijzend. 'n Paar voorstanders onder de raadsleden wisten het ten minste zoo ver te brengen, dat de zaak aangehouden werd tot de volgende vergadering. De leden hadden dan gelegenheid, de kwestie nader te „bestudeeren”. Eenigen hebben dat werkelijk gedaan, namelijk de **voorstanders**. Liever ware het ons geweest, dat de tegenstanders zich eens de moeite getroost hadden, **ernstig** het Esperanto-vraagstuk onder de oogen te zien. Maar 't ging daar zooals het bijna overal gaat: men is er tegen, en daarom vindt men 't niet noodig, zich er druk over te maken. Ziehier wat verder gebeurde.

Het bewuste punt der agenda komt ter sprake. Verschillende leden zien het nut van Esperanto voor de jeugd niet in. Een der voorstanders wijst er op, dat Esperanto wel degelijk van groote beteekenis is, ook voor de jeugd, en zegt o.a., dat men door de studie van Esperanto ook het Nederlandsch beter leert kennen. En wat antwoordt nu een der tegenstanders? Luistert goed, geachte lezers en lezeressen! Spitst uwe ooren, o vroede vaderen, want hier hebt ge 't slagwoord, waarmee ge de heele Esperanto-kwestie ineens van de baan schopt en een doelpunt maakt, zoo keihard als er nooit een gezien is:

„Dan moeten ze op school maar 'n paar uren meer aan het Nederlandsch besteden!”

Hebt ge ooit, lezer, hooren spreken van overlading van het leerplan op de Lagere School? Ik denk van wel. Deze edelachtbare blijkbaar niet. Hebt ge ooit gehoord, lezer, dat de Lagere School

zich moet aanpassen aan het dagelijksche leven? Niets natuurlijker dan dat, zult ge zeggen. Onzen geachten tegenstander schijnt dat te gaan boven zijn traditioneele pet. Hebt ge ooit hooren zeggen, lezer, dat men op de Lagere School al heel blij is, als men de leerlingen kan brengen tot zuiver schrijven, d.i. schrijven zonder al te grove spelfouten? Wat zegt U? Ja juist, dat is al een heele prestatie voor de Lagere School, want zelfs bij de gestudeerden treft men wel van die fouten aan. Onmogelijk dus, op de Lagere School dieper in de kennis van het Nederlandsch door te dringen, al is dat ook te bejammeren, want zonder die diepere kennis blijft juist het schoone van onze moedertaal voor de massa des volks een gesloten boek. Vandaar dat ons volk niets leest dan sport-verslagen, sensatieberichtjes en prulromannetjes, terwijl onze letterkunde ligt te zieltogen bij gebrek aan lezers. Maar toch, die paar uurtjes, ze kunnen er heusch niet bij. Gevolg hiervan is, dat men bij het onderwijs van Fransch bijvoorbeeld voortdurend 'stuit op de geringe kennis van het Nederlandsch, en men daar naast de moeilijkheden van de Fransche grammatica nog moet trachten, den zinsbouw en de juiste beteekenis der Nederlandsche woorden en hunne functie in den zin er in te pompen, iets wat eerst na een studie van jaren gelukt. Wat zou dat alles veel meer succes hebben, als op de Lagere School wat meer aan Nederlandsch kon gedaan worden!

Ziet ge nu wel, zoo hoor ik al van edelachtbare zijde toeroepen, ziet ge nu wel, wat ik schoon gelijk heb: ze moesten op de Lagere School 'n paar uren meer Nederlandsch geven, dan hadden we jullie Esperanto niet noodig.

Kijk, lezer, nu kunnen we dus weer vooraan beginnen, en opnieuw gaan betoogen, dat de tijd op de Lagere School dat niet toelaat. Maar neen, wordt me gezegd, laat dat dan doen op die vrije middagen, waarop ge je Esperanto-lessen wilt geven. Laat ze daar dan komen om les te krijgen in het Nederlandsch.

Accoord! Wie neemt daar het initiatief toe? Niemand? En waarom dan niet? Wel, wie zal nu z'n kinderen die kostbare vrije uren ontnemen om Nederlandsch te gaan leeren! Daar is toch de school voor, zegt het volk, en als die en die van d'r jongens Fransche Pieten willen maken, dan moeten die hun kinderen maar voor zoo iets opofferen, de mijne hebben dien poespas niet noodig, ze worden maar verwaand met hun anderhalf woordje Fransch, waar de meesten van hun leven toch niets mee doen.....

Daar zit een kern van waarheid in. Voor zeker 75 % van de leerlingen, die met de studie van het Fransch beginnen, is dit totaal verloren tijd. Maar goed Esperanto-onderwijs geeft èn nuttige kennis, die practisch in het latere leven te gebruiken is, èn het leert de eigen moedertaal beter kennen en verstaan, zonder dat daarvoor opzettelijk taalonderwijs in het Nederlandsch noodig is.

Dit was het, wat onze voorstander bedoelde. Maar om dat duidelijk te maken, daar kreeg hij helaas de gelegenheid niet voor. En trouwens, dat is ook voor gewone stervelingen zoo maar niet te snappen, niet waar? Intusschen koester ik nog de stille hoop, dat het in andere gemeenteraden, waar bedoelde kwestie nog moet ter sprake komen, wel gesnapt wordt. En men daar niet zal doen, zooals in boven niet-genoemde plaats, waar men met het invoeren van Esperanto wil wachten tot de Regeering dit zaakje ter hand neemt, en intusschen van gemeentewege Fransche cursussen geeft zonder aansporing van hooger hand.

Van consequentie gesproken.....!

S.

---

## Konversaciaj Vesperoj.

Naar aanleiding van ons artikeltje over bovengenoemd onderwerp ontvingen wij tot ons groot genoegen reeds zeer spoedig onderstaand schrijven, waarvoor wij de geachte schrijfster hartelijk dank zeggen.

Geachte Redactie,

Naar aanleiding van uw artikeltje in N. K. van Februari zou ik in alle bescheidenheid in m'n kwaliteit van ex-leidster van conversatie-avonden, dus als „spertulino” eenige wenken willen geven, die er toe kunnen leiden, die avonden ook voor niet-„fervoruloj” eenigermate aantrekkelijk te maken.

In de eerste plaats moet men trachten, een geest van onderlinge waardeering en van harmonie aan te kweeken. Dat dit een moeilijke taak is voor hem of haar, die de leiding heeft, is niet te ontkennen. In iedere vereeniging zijn echter wel meerdere leden, die de noodige capaciteiten, vooral tact, bezitten, om een gezelschap, uit heterogene bestanddeelen samengesteld, zooals onze vereenigingen gewoonlijk zijn, op aangename en nuttige wijze bezig te houden.

Het zij me vergund, eenige aanwijzingen te geven omtrent de wijze, waarop het mij gelukte, m'n kringetje getrouwen bij elkaar te houden.

Mijn clubje bestond uit een twintigtal „gesamideanoj” van 18 tot 50 jaar uit alle standen, die zeer kameraadschappelijk met elkaar omgingen. De goede geest was dus aanwezig.

Wij begonnen met het lezen van een kort hoofdstukje uit „Karlo”, het bekende boekje van Privat, een roman in een „nutshell”. Ieder op z'n beurt las een hoofdstukje per avond, en vertelde met eigen woorden den inhoud. Dat ging op 't laatst heel goed. Daarop werd een onderwerp uit de geschiedenis van den dag

te berde gebracht. De oorlog bracht in dien tijd stof genoeg. Eenigen lazen hun ontvangen Esperanto-correspondentie voor; anderen vroegen raad voor de beantwoording, en zoo vloog vaak de avond om.

Voor ieder woord, dat er gesproken werd, dat geen Esperanto was, werd een kleine boete betaald, waarvoor later, eenmaal in 't jaar, het geheele gezelschap werd getraceerd. Was er een vreemde Esperantist op de doorreis, zoo werd die uitgenoodigd, wat vaak een prettige afwisseling was.

Verder hadden we een gezelschapsspel, bestaande uit vragen en antwoorden, die dikwijls aanleiding gaven tot groote hilariteit. Om beurten hielden ook de leden een lezing over een reis, een bezoek aan een congres, een gelezen boek, enz., of werd er gedebatteerd over een of ander onderwerp, gewoonlijk van maatschappelijk belang; de eene sprak dan „pro”, de andere „contra”.

In den zomer werden de bijeenkomsten vaak vervangen door gemeenschappelijke tochtjes per fiets, waarbij, voorzoover dat gecontroleerd kon worden, steeds Esperanto gesproken werd.

Doch het beste middel, dat bij allen succes had, was het instudeeren van een blijspel in 't Esperanto. In dien tijd waren steeds allen present. Jammer, dat het stuk om technische redenen niet opgevoerd kon worden op een Esperanto-dag. Het was met zooveel animo ingestudeerd, en zou zeker een succes geworden zijn.

Ik heb slechts eenige grepen uit de practijk gedaan om te doen zien, hoe met eenige moeite en goeden wil en van den leider, en van de leden, de „konversaciaj vesperoj” in stand gehouden kunnen worden, en „last but not least” succes kunnen hebben.

Altestime Via

H. M. v. d. WIELEN—v. GRIENSVEN.

---

## Afdeulingsnieuws.

### Haarlem.

Ĵaŭdon, la 30an de januaro nia grupo kunvenis en la domo „St. Bavo”. La prezidanto Sro G. Hoogeveen malfermante la kunvenon memorigis la fakton, ke en 1929 eĉ 4 estraranoj kaj 2 ordinaraj membroj sukcesis por diplomo A, kaj esprimis la deziron, ke 1930 estu por nia klubo same sukcesplena. La protokolon kaj jarraporton de la sekretario Sro L. J. Vogels oni per danko aplaŭdo senŝanĝaj akceptis. Ankaŭ la jarkonto de la fervora kasisto pruviĝis tutperfekta.

La sinjorojn H. Majoor kaj Jac. Vollaerts, resp vic-prezidanton kaj kasiston ni aplaŭde reelektis en iliaj funkcioj.

La prezidanto konstatis la ĝojigan fakton, ke la praktika in-

tereso por nia movado en ĉiuj sociaj rondoj malrapide sed konstante kreskas; la antipatio kontraŭ Esperanto, kiu antaŭe kelkfoje esprimiĝis sen ia kaŝemo, iom post iom ŝanĝas por vera simpatio por nia movado. Niaj kursanoj studadas kun daŭra fervoro kaj promesas fariĝi firma apogo por nia Esperanto-unuiĝo.

Al la kursgvidanto, Sro Jacques Vendée oni je la nomo de la estraro kaj membroj oferis donacaĵon kiel pruvon kiom oni altŝatas lian laboron. Sinjoro Vendée per elkoraj vortoj dankis.

Lia Pastra Moŝto G. Ramboux el Parizo, ĉefredaktoro de „Espero Katolika” sendis leteron enhavantan gratulon pro la dudekjara jubileo de nia grupo „Abbé Richardson”. Tiun skribaĵon akompanis bela riĉ-ilustrita Esperanto-verko.

Post la deka vespere la prezidanto laŭ la kutima maniero fermis ĉi-tiun amiksentan multnombre ĉeestatan kunvenon.

---

## Tilburg.

Membrar-kunsido de la 14a de januaro 1930a.

Je la 8a kaj kvarono la prezidanto komencis elparolante la plej bonajn dezirojn al la A.K.P.-anoj por la jaro 1930a. Li memoris la pasintan jaron, en kiu nia unuiĝo multe progresis, kaj li esperas, ke la venonta jaro, per la kunlaborado de ĉiuj membroj, estos tre fruktodona por nia unuiĝo. Poste li malfermis la kunvenon per la Kristana saluto, kaj petis la sekretariinon legi la protokolon de la antaŭa kunveno, kiun oni poste aprobis senŝanĝa. La klubkanto estis kantata, post kio la sekretario legis la jarraporton. Tiu ĉi tre granda, amuza raporto montris klare la multan laboron de la pasinta jaro. La financa raporto, legita de la kasisto, montris profitan saldon de pli ol 7 guldenoj. La sinjorojn v. Kempen kaj Verhiel oni komisiis kontroli la librojn ktp. Sro Verhiel raportis, ke ĉio estas bonorda. Antaŭ la kantado de la kvarvoĉa Kristnaskokanto, prezentita de Frato Bartolomeo la honorinda Frato legis rakonton pri la Kristnaskfestoj. La legado kaj la kanto akiris dankan aplaŭdon.

Sekvis elekto de estraranoj. Laŭregulare la vicprezidanto, Sro Dankers, kaj la kasisto, Sro v. Riel eksiĝis. La kunveno ilin reelektis, kaj ambaŭ akceptis. Ekzistis ankaŭ vakanta loko pro la eksiĝo de Sro Vossen. Sro Stockermans estis la nura kandidato, kiun oni pro tio senvoĉdone elektis. Ankaŭ Sro Stockermans akceptis.

Ĉe la sekvanta punkto „diskutado” oni parolis i.a. pri la peto de A.R.K.A. al Sro Schendeler por fari paroladon pri Esperanto. Plue sekvis la insista peto: „Portu ĉiam la verdan stelon”, ĉar tio estas granda propagando por nia movado. Antaŭ ol fermi la prezidanto dankis la redakcion de unu el la plej influrikaj ĵurnaloj de nia urbo „Het Nieuwsblad van het Zuiden” pro la skriba kurso,



kiun ĝi komencis en siaj sabataj numeroj, ĉar tio povas doni grandan profiton al nia movado.

Sekvis fermo de la kunsido laŭ la ordinara maniero.

PRESKOMITATO.

---

## Esperanto-examen te Bergen op Zoom.

De Bergen-op-Zoomsche vereeniging „Nia Katolika Idealo” heft kunnen bewerken, dat de Esperanto-examens A en B in Mei of Juni ook te Bergen op Zoom zullen worden afgenomen, indien er voldoende deelname is.

De kandidaten gelieven zich dus spoedig op te geven bij den secretaris der examen-commissie, den Heer H. J. Bulhuis, Kamillestraat 37, Den Haag, met de mededeeling, dat zij aan Bergen op Zoom als examenplaats de voorkeur geven. Ook een berichtje aan den secretaris onzer propagandacommissie, den Heer F. J. van der Burgt, Engelschestraat 23a, Bergen op Zoom, zal ons zeer aangenaam zijn, daar wij ons dan met meer zekerheid op 't examen kunnen inrichten.

Nia Katolika Idealo zal tevens een goedkoop repetitiecursus organiseeren voor Bergen op Zoom en omstreken. Vanaf Maart zal deze cursus gedurende 3 maanden elken Zaterdagmiddag gehouden worden. Personen, die dezen cursus willen volgen, moeten zich zoo spoedig mogelijk opgeven.

NIA KATOLIKA IDEALO.

---

## Grava Demando!

Jam plurfoje oni demandis min: „Kial vi ne plu skribas en la gazetoj kaj ankaŭ ne en „N. K.”? Kial dum la polemikoj pri la elparolado kaj pri la ekzamenoj vi ne diris vian opinion?” Jen mia respondo:

Unue, mi ne ŝatas polemikon en la gazetoj, ĉar nur tre malofte la kontraŭstarantoj per la polemiko alproksimiĝas; kontraŭe: tre ofte la polemiko fariĝas pli kaj pli neafabla, eĉ akra; kaj kelkfoje okazas, ke iamaj amikoj per polemiko disiĝas je granda malprofito de la bona afero.

Antaŭ nelonge mi ricevis leteron, en kiu oni min demandis, kial tiom da iamaj fervoraj eminentuloj malaperis el nia movado. Mi, kompreneble, ne scias. Oni povas havi diversajn kialojn; sed mi tute bone komprenas, ke pacemaj personoj ne ŝatas resti en unuiĝo, kie unu atakas alian. Mi ne volas diri, ke oni ĉiam devas

samopinii kun aliaj, tute ne; sed oni ne disputu publike. Kiam ekestas disputo, mi dirus: „La disputantoj kunvenu; kaj oni spertos, ke, interparolante amike, oni facile trovos rimedon por forigi la disputon!”

La dua kialo de mia malŝato de polemikoj estas jena: Kiu Esperantisto jam ne spertis, kiel malfacile estas, konvinki la skeptikulojn pri la facileco kaj pri la utileco de Esperanto? Nu, mi mem jam ofte devis aŭdi: „Iru for kun via Esperanto! La Esperantistoj mem ĉiam disputas pri la elprononcado; ĉiam mi aŭdas pri malinterkonsento inter la Esperantistoj; kaj vi volas min kredigi, ke Esperanto estas tiel facila, kaj tiel taŭga por la interkonsento de la diversaj popoloj!”

Certe, oni facile povas kontraŭdiri tiajn diraĵojn; sed ni devas eviti eĉ la ŝajnon, ĉu ne? Mi do intence silentis, atendante pli favorajn tagojn!

Sed nun, ĉar la redaktoro de N. K. instigas la anojn de nia unuigo, aŭdigi sian opinion, mi ankaŭ volas doni la mian. Sed antaŭe mi deziras deklari, ke mi intencas ofendi neniun; kaj se la plimulto aŭ la estraro decidus alimaniere, mi jam nun rezignas, kaj mi ne malkontentiĝos.

Nun pri la grava demando: „Ĉu nia revuo „Nederlanda Katoliko” malaperu?”

„Jes”, diras Pastro Preller.

„Ne”, diras multaj Esperantistoj katolikaj, kaj inter ili ankaŭ mi. Jen miaj kialoj:

Kun N. K. malaperos ĉiu ligilo inter niaj diversaj sekcioj. Pastro Preller deziras do, ke „Espero Katolika” anstataŭos N. K. Imagu nun, ke E. K. devas enpresi la novaĵetojn, ne nur de la landaj ligoj, sed ankaŭ de la sekcioj, de ĉiuj landoj! Kiun amplekson ĝi ekhavas! Kaj la abonprezo! Plue, niaj klubaj aferoj, kiuj por ni povas esti gravaj, por la alilandanoj estos nur senvaloraj bagateloj. Pastro Preller deziras kreskigi la nombron de abonantoj de E. K. Mi ankaŭ deziras tion. Ke Sro Schendeler kaj Pastro Ramboux parolu kaj diru, kiom da abonantoj mi jam varbis. Sed mi estas certa, ke ne multaj N. K.-anoj post la malapero de N. K. abonos al E. K.! Tiuj kiuj interesiĝis pri E. K. jam estas abonantoj. Multaj el la Esperantistoj ne prenas E. K., ĉar..... (ne malplaĉu al Pro R.) ĝi estas tro malfacile komprenebla por ili. „Nu, bone”, diras Pro R., „ke tiuj lernu pli bone Esperanto'n. Sed Pro R. sciu, ke pluraj el niaj adeptoj estas nemulte instruitaj kaj ne havas talentojn nek tempon nek rimedojn por lerni bone Esperanton. Ni jam devas esti kontentaj, ke ili volas interesiĝi por la katolika afero; eĉ geinstruistoj ne daŭrigas la abonon, ĉar ĝi estas tro malfacile komprenebla al ili; kaj kelkaj daŭrigas la abonon nur por ĝin apogi.

Sed ne malpli grava kialo estas: Jam ne sufiĉas, ke I.K.U.E. ne havas (t.e. ne posedas!) sian propran revuon! Nun nia landa

ligo ankaŭ devos eniri ludomon! Milfoje ne!!!

Ĉu ni, katolikaj Esperantistoj nederlandaj, ne povus konservi nian propran revuon? Estus skandalo!! Ĉiu iom grava katolika unuiĝo havas ĝin, kaj ne ni!

„Malmultaj anoj interesiĝas pri la alveno de N. K.” diras Pro P. Kial? Ĉar ĝi enhavas polemikojn, kaj ĝi ne estas interesa! Bone; forlasu tiujn polemikojn, kaj ni zorgu, ke ĝi estu interesa! Kial „Holanda Esperantisto”, „Germana Esperantisto” ktp., prosperas? Ĉu ni ne povus fari, kion aliaj povas? Mi tion ne kredas. Kontraŭe. Ni rigardu la nederlandlingvajn gazetojn katolikajn! Ni do ankaŭ laboregu por N. K., por ke ĝi fariĝu inda je sia nomo „Nederlanda Katoliko”.

Sed estas ankoraŭ alia grava afero, ne malpli urĝa! Ni vere povas esti fieraj pri nia internacia katolika revuo „Espero Katolika”. Sed ni urĝe bezonas ankaŭ katolikan revuon internacian por niaj geknaboj. Jam multaj geknaboj katolikaj eklernis Esperanton kaj pli kaj pli ili eklernos ĝin. Do ni havigu al ili interesan revuon, sed katolikan! Oni ne venu kun „Etulo”, kiu laŭ Pastro Ramboux mem, celas esti neŭtrala <sup>1)</sup>. Tre stranga afero! La sama Pro R., kiu en sia lasta numero de E.K. (vidu No. 74, Febr. 15, paĝ. 232, lastan linion) diras, kaj tre prave: „For la neŭtralismon!” deziras, ke ni, katolikoj, apogu la neŭtralan revuon „Etulo”! Do, kio ne taŭgas por la plenkreskuloj, estus sufiĉe bona por niaj karaj infanoj! Katolikoj nederlandaj, ni, kiuj tiom da jaroj batalis kaj ankoraŭ batalas kontraŭ la neutrala instruado, ni mem donus al niaj karuletoj tiun neŭtralismon! Ree mi diras: „Ni laboru ĉiuj; for ĉian antipation, for ĉian disputon, for ĉian rivalecon! Ni bezonas ĉiujn niajn fortojn, ĉar mankas al ni ankoraŭ tro multe, por forĵeti niajn fortojn al bagateloj!

Mi do krias al ĉiuj bonvoluloj: „Kunlaboregu, por ke „Nederlanda Katoliko”, ne malaperu; kontraŭe: Ĝi kresku!! Kunlaboregu, por ke ne havigu al niaj geknaboj: interesan sed sanan, vere katolikan revuon!

FRATO WIGBERTUS VAN ZON.

### **Noto de la redakcio.**

Pastro Preller al mi sciigis, ke lia intenco ne estis, ke mi publikigu lian artikolon: ĝi nur estis cirkulero por la tiurilata komitato. La fakto, ke mi ricevis tiun cirkuleron kvarobla sen ia plua klarigo, estu por mi sufiĉa senkulpigo por ricevi la pastran pardonon. Priparolante la cirkuleron en nia estrarkunveno, ni unuanime havis la opinion, le: ke en tiu grava afero la tiurilata komi-

---

1) Vidu „Etulo”, Non 18, Nov. '29, paĝon 2.

tato ne havu la findecidon, kaj, 2e: estas dezirinde, ke ĉiuj niaj membroj ekkonatiĝu kun la poraj kaj kontraŭaj motivoj, kaj pro tio 3e: ke publikigo de tiuj motivoj estas pravigebla, eĉ aplaŭinda. Jen la kialoj, pro kiuj la artikolo aperis en nia februara numero. Niaj pacemaj membroj ne timu! Ili ne tuj, kiel frato Wigbertus, parolu pri disputado, sed pri diskutado. Kaj la temo N.K.-E.K. certe estas diskutinda, ĉu ne? Strange estas, ke multaj personoj tro facile intermiksas ambaŭ vortojn. Diskutante oni ambaŭflanke serĉas la veron, disputante oni serĉas sin mem, t. e. la venkon por sia propra opinio, se ne rilate al la problemo mem, tiam rilate flankaj aferoj; se ne per rezonado kaj argumentado, tiam per aliaj rimedoj, estu per silentado aŭ silentigado. Diskutadon mi simpatias, disputadon mi abomenas. Jen mia respondo al la unua parto de la supra artikolo. Frato Wigbertus per tio ankaŭ scias mian opinion pri lia unua frazo en la artikolo „Kelkaj vortoj al Sudano”. Li ankaŭ sciu, ke rivaleco miaflanke ne ekzistas. Se li kredas ke jes, li montru la faktojn. Mi kredas, ke mi nur laboris kaj laboras por la vera prospero de nia movado, kaj la plena evoluo de nia lingvo. Ke mi kelkafoje kriis pli laŭte, havis sian kialon en la fakto, ke aliaflanke oni suferas pro surdegeco, aŭ intence silentas pro manko de argumentoj. Mi de neniuj postulas pravigon, sed nur argumentojn, se oni opinias, ke mi estas malprava. Ĉu tio estas disputado? Ne sinjoro, tio estas **diskutado**.

Alia afero!

Frato Wigbertus riproĉas al „La Etulo”, ke ĝi estas neŭtrala. Mi dezirus, ke ĉiuj revuoj neŭtralaj estu samecaj kiel nia Etulo! Prave Frato Wigbertus laŭdas Pastron Ramboux pro la fiero per kiu li defendas la katolikan karakteron de „Espero Katolika”. Sed certe li same laŭdas Pastron Ramboux, se li sciis, pro kio „La Etulo” estas neŭtrala. Sufiĉu la demando: ĉu Frato Wigbertus ankaŭ abomenas ĉiujn neŭtralajn lernolibrojn? Ĉu li ne kun mi aplaŭdas la aperon de neŭtralaj, kvankam por niaj lernantoj sendanĝeraj lernolibroj? Certe, ni preferas la katolikecajn, kiam ili estas sambonaj. Sed: multe pli preferinda estas laŭnome neŭtrala libro aŭ revuo, bonintence verkita de katoliko, ol sama neŭtrala eldonaĵo de verkinto nekatolika, ĉu ne? Tio sufiĉu! S.

---

## Neredakcia Parto.

Geachte redactie.

Naar aanleiding van het betoog van Sudano neem ik de vrijheid eenige regelen te schrijven. Vooreerst ben ik het met de bedoeling van Sudano eens, dat ook een plaats in het Zuiden des lands worde aangewezen, waar geregeld, evenals thans in

Den Haag en Utrecht, een examen zal worden afgenomen op dezelfde voorwaarden. Ik meen, dat ons Bestuur in deze een verzoek zou kunnen richten tot de examen-commissie, om eene plaats in 't Noorden, bijvoorbeeld Utrecht, en eene in 't Zuiden des lands, bijvoorbeeld Den Bosch of Boxtel (deze genoemd als gemakkelijke verbindingsplaatsen), aan te wijzen alwaar de examens worden gehouden.

Waar Sudano nu gaat aanvoeren de splitsing tusschen boven- en beneden-Moerdijkers, daar meen ik, dat wij als katholieken, welke eene zeer groote kracht moeten en kunnen vormen, in eigen kamp geen splitsing moeten gaan bewerken.

Is men het met de inzichten of handelingen van den een of ander niet eens, welnu, dan heeft met toch het volste recht, ik meen zelfs den plicht, dit te zeggen, maar men ga niet over tot generaliseering. In 't Noorden des lands zitten katholieken, welke evengoed de gelijkberechting voorstaan als in 't Zuiden, en daarom moeten we m.i. trachten, dezen niet af te stooten, doch tot ons te trekken. Daardoor alleen kunnen we onze macht, welke in 't Zuiden niet onbeteekenend is, ten goede doen komen aan onze geheele katholieke Esperanto-beweging.

NORD-KAJ SUDANO.

---

## Kelkaj vortoj al „Sudano”.

Kara Samideano,

Mi tre, tre bedaŭras, ke N. K. ne rifuzis vian artikolon.

Se vi legis mian artikolon pri la „grava demando”, vi jam komprenos kial. Ĉiujn viajn rimarkojn vi pli bone povus sciigi al nia estraro. Ĝi, kaj nur ĝi, povos aranĝi tiujn aferojn. Sed la tono de via artikolo malplaĉas al mi plej multe. Ĉu estas necese tiamaniere eligi viajn rimarkojn? Kara Sro Sudano, verŝajne mi povas min nomi, plirajte ol vi, Sudano.

Sudano mi estas pro naskiĝo, Sudano pro mia loĝloko, ĉar mi loĝas en la plej malluma, suda parto de la lando: Reusel, unu el la tiel nomataj „Acht Zaligheden”: Reusel, Bladel, Duizel, Eersel, Steensel, Knegtsel, Netersel kaj Hulsel; sudano mi estas pro mia laboro, sudano pro miaj multegaj sudaj amikoj, inter kiuj eble ankaŭ vi! Do neniu pridubos mian veran, sinceran amon je ĉiuj sudanoj! Kaj tamen, mi povas kaj devas refuti ĉion kion vi diras. Ĉar vi eraras mult-, se ne ĉiuflanke. Pri la estonta(?) ekzameno en Amsterdam vi jam ricevis respondon de la redakcio mem en la sama numero de N. K. Amsterdam havos sian ekzamenon,

kondiĉe ke tie estos sufiĉe da kandidatoj, kiel ĉiu urbo, kaj eĉ ĉiu vilaĝo povos havi sian ekzamenon je la sama kondiĉo, ekz. Schijndel kaj Grave havis sian ekzamenon.

Oni privilegius la „Boven-Moerdijkers”!! Bonvolu aŭskulti momenton: La lastajn jarojn okazis ekzamenoj en: 1. Den Haag, 2. Alkmaar, 3. Utrecht, 4. Nijmegen, 5. Groningen, t. e. kvin norde de Moerdijk! 1. Bergen op Zoom, 2. Breda, 3. Tilburg, 4. Grave, 5. Schijndel, 6. Maastricht, 7. Heerlen, do sep sude de Moerdijk! Ĉu vi sciis tion? Se ne, kial vi antaŭe ne pli bone informiĝis? Se jes, kial vi povas skribi tiamaniere?

Eble vi ne estas kontenta pri la du tiel nomitaj oficialaj ekzamenoj? Sed, kiu elektas aŭ elektis Den Haag kaj Utrecht? Mi ne scias. Sed, kion mi jes scias, estas jeno: La anoj de la tri unuigoj elektas sian estraron; la tri estraroj elektas la ekzamenontojn; do, ĉi tiuj estas la mandatuloj de la estraroj. Nu, unu el la du okazos: ĉu la diversaj estraroj fiksas la lokojn de la oficialaj ekzamenoj, aŭ la ekzamenkomitato faras tion. Ambaŭokaze vi do povos direkti vin al la estraro; ĉi tiu povos aranĝi ĉion laŭvole. Do ŝajnas al mi, ke ne estas necese fari tiom da bruo pri la afero. Verŝajne nia nuna loko-prezidanto mem scias ĉion pli bone; li ja dum multaj jaroj estis ano de la ekzamena komitato kaj de nia estraro. Ke li do parolu, ĉu mi eraras; mi ja ne estis ĝis nun ano, sed nur **anstataŭanto**. Kia hazarda okazintaĵo: preskaŭ la saman tagon, en kiu mi ricevis sciigon, ke la estraro min elektis ano de la ekzamena Komitato, Sudano postulas **forigon** de la antaŭaj ekzamenantoj!!! Ĉu fatalo?

„Ringelooren???” En la jaroj, dum kiuj mi ĉeestis multajn ekzamenojn, mi ankoraŭ neniam vidis ion pri „ringelooren”! Mi nur povas diri, ke ĉiam ĉio okazas tre amike; oni vidas neniun diferencon, nek inter malsamaj kredanoj, nek inter sud- aŭ nordanoj! Mi povus ankoraŭ multe pli diri rilate apartajn ekzamenojn, sed pli bone estas tion ne diri publike; plue: mia artikolo fariĝus ankoraŭ pli longa. Mi nur volas diri jenon:

Pasintan semajnon vizitis min katolika senatano por preparoli pri-Esperanto-aferojn. Li i. a. diris: „Frato Wigbertus, kiom Vi jam atingis en 4—5 jaroj! Vi donis viajn junajn jarojn al la Misioj inter la sudamerikanoj. Nun Vi havas novan mision, kiu estas egale necesa. Ne, mi eĉ diras: pli necesa ol la unua. Mi deziras al Vi pluan sukceson, kaj se mi Vin povos helpi, venu ĉe mi. Mi ĉiam estos disponebla por Vi.”

Ke tiuj vortoj nin kuraĝigu!

Por fini mi refoje diras: Ni agu ĉiam paceme, kaj oni ne supozu tro senpripense malbonan volon. Kaj se oni volas akiri ion, memoru: „Oni kaptas pli multajn muŝojn per guto da mielo, ol per barelo da vinagro!”

Reusel.

FRATO WIGBERTUS VAN ZON.

Rimarko de la redakcio.

Ĉar nia estimata Frato Wigbertus aludas mian sperton dum la jaroj, kiam mi estis membro de la ekzamena komitato mi devas respondi, ke jam de longe la komitato mem decidis, ke laŭvice la ekzamenoj okazos en Hago kaj Utrecht. Tiutempe tamen la nombro de la kandidatoj estis ne tre granda. Plue la komitato ĉiam devis esti tre ekonomia por ne kaŭzi deficiton. Komprenoble estas plej bone, ke la komitato mem decidu pri la lokoj de la ekzamenoj, kaj ni volente al ĝi lasos tiun rajton, se ĝi volas aŭskulti pravajn kaj plenumoblajn petojn. Se tamen la komitato restus intence surda (kiel ankaŭ alirilate ĝi restis surdega), tiam estus devo de nia ligo, postuli la plenumon de tiuj petoj. Pro tio estas dezirinde, ke la N. K.-membroj de la komitato uzu sian influon, ĉar: „Oni kaptas...” (vidu supre!).

---

## Eraroj!

Onze lezers zullen zeker wel bemerkt hebben, dat de samenstelling van het vorig nummer van ons orgaan zoo overhaast heeft moeten geschieden wegens den laten datum onzer Hoofdbestuursvergadering, dat eenige artikelen ongecorrigeerd ter perse zijn gegaan. We hopen, dat ze ons de ergernis van enkele ingesloten fouten zullen vergeven, gelijk wij vergeving schenken.....

---

## Onze Jaarvergadering.

Het Hoofdbestuur besloot na schriftelijke stemming met vijf tegen drie stemmen, dat onze jaarvergadering zal gehouden worden te Nijmegen. In ons volgend nummer hopen wij dus, na overleg met onze Nijmeegsche afdeeling, nadere bijzonderheden te kunnen mededeelen.

---

## Candidaten voor het Hoofdbestuur.

Wij vernemen, dat door de afdeeling Tilburg zijn candidaat gesteld voor de verkiezing tot lid van het Hoofdbestuur de Heeren F. Marreeve te Den Haag, en J. H. Westen te Groningen.

---

## Atenton! Korespondado!

Kiuj el niaj membroj deziras korespondadon kun Anglujo?

Sro Cyril Kellett, 17, Bridge str., Colne (Lancs.) Anglujo. deziras korespondi per leteroj aŭ ilustritaj poŝtkartoj pri katolikaj aferoj.

# Algemeene H. Communie.

De datum voor de algemeene H. Communie van de leden van onze internationale katholieke Esperantisten-vereeniging (I.K.U. E.), dus ook van de leden van „Nederlanda Katoliko”, is: Zondag na het feest van den H. Casimir, dus 9 Maart a.s.

---

## Aan de leden van „SUDA KRUGO” te Eindhoven.

Alle leden van onze afdeeling „Suda Kruco” worden verzocht, aanstaanden Zondag om kwart voor negen aanwezig te zijn in de St. Catharina-Kerk, rechter zijbeuk, dus aan den kant der Kerkstraat. We zullen dan gezamenlijk ter H. Tafel gaan voor de H. Mis van 9 uur. Wij verzoeken vriendelijk, dat ook allen deze H. Mis willen bijwonen, om daarna te gaan naar het gebouw van den R.K. Volksbond, alwaar een gemeenschappelijk ontbijt zal plaats hebben, waarna de vergadering onzer afdeeling. Zie hier de agenda:

1. Opening. 2. Notulen der vorige vergadering. 3. Bespreking der voorstellen voor de Jaarvergadering van „Nederlanda Katoliko”. 4. Verkiezing van afgevaardigde en plaatsvervanger voor de Jaarvergadering. 5. Rondvraag. 6. Sluiting.

Het plan bestaat, wanneer deze regeling in den smaak der leden valt, telkens na de Algemeene H. Communie der IKUE-leden (dus viermaal per jaar) onze vergaderingen te houden. We zouden daarom gaarne zien, dat alle leden aanstaanden Zondag present zijn.

Namens het Bestuur,  
A. PHILIPPE, Secretaris.

---

## R.K. Vereeniging van Leeraren

tot bevordering van het handelsonderwijs.

**Examen Esperanto-Handelscorrespondentie.**

**Vrijdag 20 December 1929 van 9 tot 1 uur.**

Te vertalen in het Esperanto:

1. Wij hebben naar de soliditeit van den Heer X. laten informeeren, doch onze berichtgever deelt ons mede, dat het niet raadzaam is, hem het gevraagde crediet te verleen.

2. Nauwelijks waren de goederen aangekomen, of hij vroeg ons, of wij hem ter wille zouden willen zijn met het factuurbedrag



direct te remitteeren.

3. Onze artikelen worden overal met succes verkocht, doch zij zijn dan ook van de beste grondstoffen gemaakt, terwijl aan de afwerking de grootste zorg wordt besteed.

4. Wanneer men in die landen zaken gaat doen, moet men zeer voorzichtig zijn, want er zijn daar veel firma's, die men niet vertrouwen kan.

5. Ik heb eergisteren uw voorstel in onze vergadering ter sprake gebracht, doch ik ben er niet in geslaagd eene meerderheid er voor te vinden.

---

Vertaal in het Nederlandsch:

La famo de Frankfurt, kiel foira urbo, reiras ĝis frue en la historion de la eŭropaj komerco kaj trafiko. Ĝiaj malnovaj famaj foiroj, fieraj posedintoj de privilegioj kaj protektoleteroj, kiajn similajn posedis neniu alia komercista loko, havigis al ĝi la honorplenan kaj samtempe signifan nomon „patrino de ĉiuj komercistaj metioj”. Malmultaj okazintaĵoj grandstilaj sub la signo de l'flugila vergo de Merkuro, malmulte da komercaj entreprenadoj estu okazintaj de post komenco de la mezepoko, kiujn ne partoprenis la komercistoj kaj financuloj de Frankfurto. Tiamaniere antaŭ unu kaj duona jaro, post finiĝo de la mondmilito, ĉe la vivigo de la novaj internaciaj foiroj de Frankfurto, oni povis rekomenci sur bazo de tradicioj neniam forgesitaj. Ĉi tiuj tradicioj eĉ daŭradis efike fortoplene ankaŭ tiam, kiam la iamaj komercaĵo-foiroj nek en la metropolo de l'Majno nek aliloke estis plu kapablaj ĝuigi avantaĝojn al la evoluo de l'moderna komercaĵa debito.

---

Ten behoeve onzer leden, die zich oefenen voor het Handelsdiploma voor Esperanto, zullen wij in ons volgend nummer de vertaling geven van bovenstaande examen-opgaven. Ook de brieven en telegrammen zullen geleidelijk een beurt krijgen. Belangstellenden kunnen intusschen hunne krachten aan het bovenstaande beproeven.

---

## Recenzoj.

P. Heilker: La Juna Esperantisto, 3e deeltje.

Dit derde deeltje beantwoordt ten volle aan de verwachting die wij gesteld hadden na het doorlezen van de twee eerste deeltjes. De stof is met vakkennis gekozen, en, men voelt het, door een vakman behandeld. Wij kunnen ons voorstellen, dat de jeugdige studenten het met plezier en met vrucht zullen bestudeeren, en dat

zij, na het doorgewerkt te hebben, overtuigd zullen zijn, dat zij reeds heel wat van Esperanto kennen. Dat de boekjes in den smaak vallen, blijkt wel uit het feit, dat van het eerste deeltje reeds een tweede druk noodig was. Met verlangen en tevens met vol vertrouwen zien wij dan ook het vierde en laatste deeltje tegemoet. Ook de uitgever heeft eer van zijn werk: het boekje ziet er goed uit, en..... wat heel wat zegt: wij hebben slechts een paar drukfoutjes kunnen ontdekken, en één vergissinkje; op blz. 24 staat: **demandi**, waar wij **peti** zouden gebruiken.

### FRATER WIGBERTUS VAN ZON.

---

J. Kondukanto: Heroa Amakto.

De grootste eer voor Esperanto is: in dienst te mogen staan van goede werken. Aan de Heroa Amakto, de heldhaftige liefdedaad, werd hier door middel van Esperanto meer bekendheid gegeven, en dit in goeden stijl en juiste terminologie. Het werkje zij tot voordeel van de Geloovige Zielen en van degenen, die deze daad verrichten!

---

Falsaj Juveloj. Traduko de A. Vrankrijker. Uitg.: „Mi Servas”.

De katholieke Esperantisten zullen den uitgever dankbaar zijn voor de goede bedoeling: korte Esperantowerkjes met goeden, min of meer spannenden inhoud, en licht verteerbaar, zoodat zij iederen katholiek in handen kunnen worden gegeven, zijn broodnoodig. „Falsaj Juveloj”, en in hetzelfde werkje „Fantazio” zijn van dien aard. Wil men echter, dat aan deze uitgave een blijvend goede moeten toeleggen op het vermijden van zinstorende drukfouten, naam zij verzekerd, dan zal men zich met de allergrootste zorg die nu legio zijn. Op deze 14 bladzijden druk klein formaat telde ik er 'n honderd.

---

La Heroino de Timodero. Traduko de Frato Ferdinando. Uitgave „Mi Servas”.

Boeiend en stichtend Missieverhaal. Wanneer het niet wordt gelezen door zeer velen en niet met onverdeeld genot, dan moet wederom de schuld worden geschoven op rekening van een „aro da preseraroj”. Hier en daar doet zich een nieuwbakken Esperanto-woord voor, waar wel een ander met burgerrecht te vinden was geweest: kringo bijv. zagen wij graag door „rondo” vervangen. Toch mag het werkje zeker gerekend worden onder de goede Esperanto-lectuur en zal het ons verheugen, wanneer het in breede oplagen wordt verspreid.

---

# ALLEN PRESENT

aanstaanden Zondag 9 Maart

## AAN DE H. TAFEL

om de H. Communie op te dragen tot de

### INTENTIE:

De Vooruitgang

onzer katholieke Esperanto-beweging in dienst van onze Moeder de H. Kerk.

## NIEMAND ONTBREKE!

---

---

# **SEMERETO**

Dit is de naam van den  
schriftelijken

## **ESPERANTO-CURSUS**

in 56 lessen, in zijn ge-  
heel verkrijgbaar tegen  
den uiterst billijken prijs  
van 2 gulden aan on-  
derstaand adres.

# **SEMERETO**

Dit is ook de naam van  
het leerboekje

## **VOOR DE LAGERE SCHOOL,**

verschenen in 2 deeljes  
1e deeltje f 0.25;  
2e deeltje f 0.40.

Beide uitgaven zijn volgens dezelfde eenvoudige, be-  
proefde en zeer bevattelijke methode, die het Esperanto  
onder het bereik brengt van iedereen.

Verkrijgbaar bij:

**P. A. SCHENDELER, - Eindhoven**  
Prins Hendrikstraat 30e

---

**Opstellen**  
**over het wereldtaal probleem.**

**PRIJS 10 CENT.**

Verkrijgbaar bij de

**AUTOMATISCHE DRUKKERIJ**  
**B. VAN EERD & Zn. TILBURG**

